# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 58, Numero 03, marto 2023*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Estrarkunveno de EFNSK

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*

La 5-an de marto ni havis estrarkunsidon. Jen kelkaj punktoj pri kiuj ni diskutis:

Fine de Februaro la lukontrakto kun Hugh, kiu dum multaj jaroj luprenis la atelieron malantaŭ Esperanto-domo, finiĝis. Do nun tiu parto estas malplena kaj ni profitos por fari multajn riparojn. Ni ankoraŭ pridiskutos kion fari kun tiu konstruaĵo.

Neprofitcelaj organizoj rajtas havi senpagajn google reklamojn. Ni intencas do fari tiajn reklamojn, tamen ni ankoraŭ ne eltrovis kiel komenci la reklamadon.

Pradip Ghimire, kiu loĝas en Nepalo, vojaĝos al Sidnejo en Aprilo. Espereble li vizitos Esperanto-domon kaj ni havos okazon babili kun li.

Ni provos sendi Telopeon al vi regule ĉiun monaton.

La venonta estrarkunsido okazos dimanĉon la 2an de Aprilo je la 9a horo matene per zoom.
Ĉiuj estas bonvenaj partopreni kaj doni al ni ideojn por disvastigi Esperanton.

## "La fabriko"

*Alan Turvey, direktoro de EFNSK*

Tri direktoroj, Jonathan Cooper, Alan Turvey kaj Dmitry Lushnikov kunvenis en Esperanto-domo la 22-an de marto por inspekti la malantaŭan konstruaĵon "la fabriko" kiu nun estas vaka. Arkitekto, konatulo de Jo, ankaŭ venis por vidi la konstruaĵon. Membroj Eric Turvey kaj iama membro Richard Delamore venis poste kaj ankaŭ inspektis la konstruaĵon.

Estas kvar arkitektoj kiuj esprimis iom da intereso pri la projekto.
La arkitekto, kiu venis merkredon, informos nin, ĉu li interesiĝus. En la venonta kunveno (2an de aprilo) ni aŭdos de Ewa (prononcita Eva) dezajnisto kiu ankaŭ parolis al arkitekto por elpensi dezajnon. Greg, pola arkitekto, kiu donis al ni ideojn antaŭe, esprimis intereson. Kaj kontakto de Dmitri ankaŭ sendis prezgvidilon por la projekto.

La prezo de konstruado aŭ renovigo pliiĝis kaj la fabriko bezonos uzon de la plej multaj el niaj bank-financoj. Kelkaj arkitektoj kiujn mi kontaktis diris, ke ili ne interesiĝas, ĉar ili opiniis, ke nia ebla buĝeto estas tro malgranda.

Intertempe ni eltrovos ĉu iuj el la artistoj, kiuj estis tie, aŭ konatulo de Dmitry, interesiĝas pri la luado de parto de la fabriko dum ni prilaboras la alian parton.

La plej bonsona koncepto, kiun ni aŭdis ĝis nun por la konstruaĵo eble rilatas al "boarding house" (pensiono?), ĉar la limigoj ne estas tro striktaj kaj ŝajnas ke ĝi povus enesti la ekzistantan konstruaĵkadron.

Bonvolu veni al la kunveno la 2-an por aŭdi pri la koncepto de Ewa kaj diskuti la diversajn proponojn prezentitajn ĝis nun.

## KER-ekzamenoj 2023

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

En 2023 la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kuraĝigas aŭstraliajn esperantistojn partopreni en la KER-ekzamenoj.

La KER (Komuna-Eŭropa-Referenckadra) ekzamensistemo estis kreita por doni komunan bazon por la priskribo de niveloj de lingva kapableco, kaj faciligi la komparon de lingvaj kvalifikoj trans diversaj landoj kaj eduksistemoj.

Oni povas ekzameniĝi je niveloj B1, B2 kaj C1, en skriba, parola aŭ ambaŭ partoj. Ĉi-jare la ekzamenoj okazos en junio (interrete) aŭ aŭgusto (fizike, ĉe la Universala Kongreso en Torino).

Por certigi ke ni en Aŭstralio havas la oportunon ekzameniĝi interrete je konvena horo (ĉar la organizantoj laboras laŭ eŭropa tempo), AEA klopodas kuraĝigi kiel eble plej da homoj aliĝi al la ekzamenoj. Tiel ni, kiel granda grupo, povas peti taŭgan horon por la evento.

Por allogi homojn AEA decidis redoni al aŭstraliaj sukcesintoj de la ekzamenoj duonon de la aliĝkosto! Simple sendu viajn detalojn al info@esperanto.org.au post kiam vi ricevis vian rezulton.

Por pli da informo pri la ekzamenoj, vizitu: edukado.net/ekzamenoj/ker

Ankaŭ estos kelkaj inform- kaj prepar-sesioj, por kiuj oni povas aliĝi.

Kiom ĝi kostos?
Se vi pretos presi vian propran atestilon, la laŭnivelaj kotizoj estas:
B1: 74€
B2: 84€
C1: 94€

Se vi volas ekzameni nur vian parolan kapablon aŭ vian skriban kapablon, duonigu la kotizon.
(Ekz-e, parola – aŭ skriba – ekzameno je nivelo B1 kostos 37€.)

Se vi volas, ke presita atestilo ja estu sendata al vi, aldonu 8€. (Ekz-e, plena ekzameno je nivelo B1 kun presita atestilo kostos 82€.)

Por vidi kompletan liston de aliĝkostoj, vizitu: edukado.net/ekzamenoj/ker/kotizoj
(Aŭstralio estas “Baza lando”.)

Ne certa je kiu nivelo vi devus ekzameniĝi?
Konsultu: edukado.net/upload/enhavo/dosieroj/ker_printebla.pdf
Se vi interesiĝas, estus bone ke vi aliĝu al la ekzamenoj kiel eble plej frue por faciligi la laboron de la organizantoj.
Trovu la aliĝilon por via nivelo ĉe: edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj

## Gastoj de Esperanto Domo

*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*

La 1-an de marto 10 studentoj de Sidneja Universitato vizitis Esperanto-domon.




Ariana Haghighi, redaktoro de la studenta ĵurnalo “Pulp” (https://www.pulp-usu.com), sugestis inviti siajn amikojn.



Ariana unuafoje vizitis Esperanto-domon en oktobro 2022 por kolekti informon por [artikolo pri Esperanto Domo.]

Ni ankaŭ povis renkonti ŝin kun kelkaj amikoj dum la Zamenhof Tago la 17-an de decembro.

La 1-an de marto pliaj amikoj de Ariana vizitis nin. Jonathan Cooper faris gvidadon por niaj gastoj kaj respondis demandojn de ili.
Esperebele ni denove vidos ilin en Esperanto Domo.

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estrarano: | Chris Betcher, Adam Levy, Dmitry Luŝnikov |